


# Kulturaj Kajeroj


DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

***JARABONO :***

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

NOVEMBRO - DECEMBRO

**1969** **6**

# KULTURAJ KAJEROJ

1969 — NOVEMBRO - DECEMBRO.

Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

**Komitatanoj :**

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

**Pri Grésillon**
Programo 1970

**Esperanto tra la mondo** — A. Frangeul

**Thomas Cook** — P.Brachon (trad. S.G.).

**Aŭtoramo**

**Francaj verkoj en Esperanto** — J.G. Fowler

**Poeziaĵoj :**
Ivan Andrejeviĉ Krylov — Al. Logvin

**Rakontoj de hieraŭ kaj hodiaŭ**
La Hardvibele — J.A. Kraemer
La koro de J. Schmidt — L. Tihanyi

**Por via distro :**
Nia konkurso — P. Chevalier

**Gramatiko per bonhumoro.**

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

# Programo 1970

**KULTURAJ KAJEROJ DEZIRAS AL ĈIUJ NIAJ LEGANTOJ ĈION BONAN POR LA ★ JARO 1970 ★**

**En Februaro :**

**Alveno la 4-an - Foriro la 10-an**
**Alveno la 10-an - Foriro la 18-an**

GRAMATIKO-KURSOJ -- KONVERSACIOJ
(sendu aligoĵn antaŭ la 15-a de Januaro)

**Paskaj Ferioj :**

**Alveno la 22-an de marto - foriro la 4-an de Aprilo**

STUDOJ KAJ PEDAGOGIO

1-a SEMAJNO (22 - 29 de marto) :

9-a Kultura Semajno
organizita de U.F.E. kaj G.E.E.

Studo de tekstoj - pedagogia inicado al instruo de Esperanto.
Kultura kaj arta aplikado de la lingvo — Ekskurso.
Seminario por respondeculoj de informado.

2-a SEMAJNO (29-an de marto - 4-an de aprilo) :

Kursoj -- Konversacio
Aplikado de la lingvo. Kun F-ino Kimie OZAWA el Japanio.

**Dum la somero :**

1-a PERIODO **(alveno 28-an de junio - foriro 12-an de julio) :**

SEMINARIO POR KURS - KAJ GRUPGVIDANTOJ
en formo de forumo kun dezirinda partopreno de lernantoj
rolo de teatro en la aktivigo de grupo aŭ kurso

2-a PERIODO **(alveno 12-an de julio - foriro 26-an de julio) :**

KULTURAJ KAJ TURISMAJ INTERNACIAJ FERIOJ
**TEATRO - ARTO**
Prelegoj, aktorado, pupteatro — Ekskursoj

3-a PERIODO **(aveno 26-an de julio - foriro 9-an de aŭgusto) :**

ESPERANTAJ STUDOJ
Tri kursoj, ekzamenoj — Ekskursoj

4-a PERIODO **(alveno 9-an de aŭgusto - foriro 30-an de aŭgusto) :**

KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ
Diversgradaj kursoj, ekzamenoj, bindado, korbofarado, ekskursoj.
**POSTE la interesatoj povos ĝui ripozigan periodon.**

La detala programo de ĉiuj periodoj aperos en januaro

Informoj : **M.C.E., Grésillon, 49 - BAUGÉ, Francujo**

# Esperanto tra la Mondo ★

**Renkontiĝoj :**

**La 3a lerneja konferenco :** tuj post la kongreso en Helsinki, okazis la 3a konferenco por la lernejoj, kie oni instruas esperanton. Partoprenis proksimume 100 delegitoj de 17 landaj asocioj de U.E.A. kaj de 12 landaj sekcioj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Estis 7 oficialaj reprezentantoj de 7 registaroj. Nova Pedagogia Revuo aperos. La respondeculo de la konsulta Komisiono pri Lernejoj de UEA estas Sro Günther Becker, Alter Hangarten 2, 6653 Blieskastel (FRG).

**Por la Universala Kongreso de Vieno :** Infana kongreseto okazos kaj junulara tago estos organizita. Pri ekskursoj : la LKK preparas tre interesajn ekskursojn, ankaŭ ŝippromenadon sur Danubo, postkongresan rondvojaĝon tra Aŭstrujo, ferian restadon en Salzburg, k.t.p. Verŝajne estos ebleco ekskursi al proksimaj eksterlandaj urboj. La Prezidanto de Aŭstrujo, Sro Franz Jonas, esperantisto, estos la Alta Protektanto de la Kongreso.

**La Universala Kongreso 1971 en Londono** : En 1971, la universala Kongreso de Esperanto okazos en la brita ĉefurbo... kaj ni memorigas ke, la kongreso 1972 okazos en Usono, en Portland (Oregon) ĉe la Pacifika Marbordo.

**Somera esperanto-universitato en Ĝyula, Hungario :** Ĝi okazos de la 5a ĝis la 11a de Julio, kun riĉa programo de prelegoj, en la ĉarma, historia ĝardenurbo de Ĝyula. Petu informojn al : Konsilantaro de la somera esperanto universitato, Ĝyula, 48-as u 11 sz. Hungario.

**Kongreso-renkontiĝo franca, monaka, itala :** Tiu manifestacio estos organizata dum Pentekosto (15-19 majo 1970) en la bela urbo Monte-Karlo. Informiĝu ĉe la koncernataj asocioj (por Francio : U.E.F., 34, rue de Chabrol, 75 - Paris 10e).

**En lernejoj :**

**Estonaj lernejoj ekpermesis esperanton** : La Ministrejo de Klerigo de Estona S.S.R. ek de la nuna lernjaro permesas la instruadon de la internacia lingvo Esperanto en la okaj klasoj de la lernejoj de tiu balta respubliko. La decido sekvas similan paŝon en najbara Litovujo, kie lastjare 19 lernejoj ekinstruis Esperanton.

En la Universitato de Budapeŝto, la instruado de esperanto, fare de Prof. I. Szerdanelyi, fariĝis definitiva. Nunjare, 7 studentoj ricevis la diplomon por instrui esperanton en la mezlernejoj.

En Italujo, 19 italaj diverspartiaj deputitoj submetis al la Deputita Cambro, novan leĝoprojekton por la instruado de esperanto en la elementaj kaj duagradaj lernejoj. En tiu lando, la sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.) havas 148 anojn en 49 urboj.

Restariĝis la lerneja komisiono de la junulara esperanto-asocio TEJO ; ĝi direktos sian agadon al la mezgrada lernejanaro kaj instigos al praktika utiligo. Notu la adreson de la ĝenerala sekretario de TEJO : Dro Humphrey Tonkin, 2131 Tryon Street, Philadelphia Pa. 19146, Usono.

**Festivaloj :**

**Pupteatra Internacia Festivalo en Esperanto :** 4.000 spektantoj rigardis la pupojn de ses profesiaj trupoj el kvin landoj... kiuj ludis en esperantoe! Jen estis la nekutima spektaklo en la IIa Pupteatra Internacia Festivalo, iniciatita de la Instituto por oficialigo de esperanto kaj kiu okazis inter la 3a kaj la 8a de oktobro, en Zagreb. Tre sukcesa estis ankaŭ la simpozio « Esperanto kiel sceneja lingvo » kaj notinde estas ke fondiĝis centro por organizado de turneoj de pupteatroj kun spektakloj en la internacia lingvo. Tiu servo bonvenigos invitojn el ĉiuj landoj. Rilatu kun : Pupteatra internacia festivalo, Esperanto-centro, Amruŝeva S/I, Zagreb, Jugoslavioe?

**En komerco :**

**Milana foiro ekuzas Esperanton** : La ĉiujara Internacia Specimena Foiro de Milano ek de la venonta jaro uzos la Internacian Lingvon Esperanto en sia informado. Oni presigis afiŝojn tiulingvajn por reklami la Foiron de 1970, kiu okazos inter 14 kaj 25 aprilo.

**Eldonaĵoj :**

**La unika laboro de la eldonejo « Stafeto » :** Jus aperis la aŭtuna katalogo de la eldonejo « Stafeto ». Adreso : J. Regulo, eldonisto, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj. Tiu listo entenas la 75 titolojn de la jam eldonitaj libroj, zorge elektitaj por nia plezuro... kaj la literatura progreso de nia lingvo.

Ĵus aperis : « Oportuna vortaro de Ordinara Esperanto » verkita de Vilho Setälä.

**Kolektantoj :**

Vi povas ricevi senpagan specimenon de « La Esperantista Kolektanto ». Kunlaborantoj serĉataj. Adreso : R. Melo, 15, rue Richelandière, 42 - Saint-Etienne, Francujo.

# Thomas COOK

**(1802 - 1892)**

En vilaĝo de Midlands, en Derbyshire, sur la muro de tre simpla domo, oni povas legi, gravuritajn sur ŝildo, tiujn modestajn vortojn « Thomas Cook, vojaĝ-agento, naskiĝis ĉi tie en 1808. Li igis la vojaĝojn pli facilaj ».

Nenio montris, ke destino de Thomas renkontos malfacilaĵojn kaj triumfojn. Nepo de pastoro, je sia 4-a jaro, li perdas sian patron. Tre frue, li forlasas lernejon por perlabori sian panon ; unue, kiel ĝardenist-helpanto, li vizitas foirojn por vendi fruktojn, kaj legomojn : piede, multe da kilometroj por malgranda salajro ; due, kiel lignaĵist-lernanto ĉe sia patrina onklo. Li estas laborema kaj konscienca. Sed la du mastroj estas drinkemuloj kaj pasas sian tempon en trinkejoj. En 1825 li eniras en baptistan sekton kaj laŭ konsilo de la pastoro de Melbourne revenas al sia patrino. Ŝi havas butikon en kiu ŝi vendas potaĵojn kaj kelkajn religiajn librojn. Thomas disdonas en la ĉirkaŭantaj vilaĝoj la religiajn broŝurojn eldonitajn de la pastoro por la « Dimanĉolernejoj ». Tie, li renkontas Mariane Mason. Ili fariĝas geedzoj.

Ĉar la sekto malriĉiĝis kaj ne plu povas lin pagi, Thomas laboras en sia propra lignaĵistejo. Je tiu periodo, li enskribiĝas en por-abstineco-asocio (Teetotalers). Iom pli poste, s-ino Cook zorgas, por akcepti abstinec-anojn, pri hotelo en kiu li vendas religiajn periodaĵojn, medalojn, poŝtkartojn, flugfoliojn pri kiuj li recevas 10 % de la vendoj. Pli malfrue li havos sian propran presilon.

Dum tiuj longaj piediradoj (en 1829 ĉirkaŭ 2106 « miles ») al la vilaĝoj, cele al predikado, li pensas pri tiuj nove uzataj trajnoj, kiuj permesas vojaĝojn rapidajn kaj nelacigajn.

Konklude, li proponas al siaj adeptoj uzi tiujn trajnojn okaze de proksima pri-abstineco-renkontiĝo. Li estas entuziasme aplaŭdita. Post interkonsento kun la trajno-Direktado, post multaj interparoladoj pri transporto de tiom multe da personoj, el Leicester, Nottingham kaj aliaj lokoj, 570 pioniroj, antaŭigitaj de ĥorsocieto, meze de zumzumaĵoj, entrajniĝas en 9 senkapotigitajn vagonojn ; abunde ornamitaj de medaloj kaj ordenoj, la « novaj krucistoj » kun flirtantaj flagoj kaj standardoj adiaŭas la spektantojn. En Loughboro' pli ol mil personoj profitas la tuttagan feston : oni manĝas, oni dancas, oni aŭskultas edifajn paroladojn. Je la 22-a kaj duono la trajno realkondukas al Leicester la heroojn : unuaj veraj turistoj, sanaj kaj savitaj, lacaj kaj kontentaj : la unua turisma agentejo jus naskiĝis.

Thomas Cook multobligas la pertrajnajn vojaĝojn por siaj kunreligianoj. Sed, interkonsente kun Midlands — Kompanioj, li organizas ekskursojn ankaŭ por lernejanoj kaj vojaĝamantoj.

Pli kaj pli longiĝas distancoj kaj prezoj.

Skotlando,, kun siaj grandiozaj melankoliaj pejzaĝoj, siaj lagoj famigitaj de W. Scott estis atingebla nur de la plej riĉaj. Tiam, laŭ la spruroj de Reĝino Viktoria kaj Princo Albert, T. Cook veturigas turistojn laŭ cirkvito 3.000 km-a.

En Edinburgh — ĵurnaloj oni povas legi : « la Angloj invadas Skotlandon. Ilia ĉefgeneralo atentas eĉ la plej malgrandan detalon. La ekskursoj daŭras unu semajnon. Liaj trupoj, laŭ ilia deziro restadas ĉi tie tiom longe, kiom ili deziras... dum li reiras Anglujon por alia vojaĝo.

Nekomforto kaj marmalsano malaperas malantaŭ kanono-pafoj, akceptadoj, festenoj kaj paroladoj.

★



John Mason, fils de Thomas, lernis presarton en Derby, sed dum la someraj libertempoj, li helpas sian patron.

Ili ĵus projektis vojaĝon al Ameriko, kiam ŝance Thomas renkontiĝas kun Duko de Devonshire kaj kun Prezidanto de Midlands - fervojoj. Ambaŭ de-

ziras, ke oni veturigu al la Ekspozicio, en Londono, je kosto de po 15 Ŝ. por persono, plej multe da turistoj. En Hyde Park estas vizitindaj mirindaĵoj — precipe la « Kristal - Palaco ». Sed konkurencanto petas nur 5 ŝilingojn por la sama vojaĝo! Sen hezito, post interkonsento kun la Direktoroj, Thomas malpliigas la prezon ĝis 2-3 ŝilingoj. Pli bone iom perdi kaj konservi la klientaron!

En Londono, li spertas novan, nepre solvendan, problemon : loĝadon de granda nombro da turistoj. Post tiu eksperimento, li malfermas en Leicester unuan hotelon (kun parolad-ĉambro kaj danc-ĉambro )por abstinec-anoj, kaj alian por familioj kaj komercistoj. Kompreneble alkoholo estis malpermesata, kaj oni devis fumi en aparta ĉambro.

★

Denove en 1855, okaze de Ekspozicio en Parizo, T. Cook trovas, antaŭ si, konkurencanton; li povas veturigi la turistojn nur de Leicester al Calais.

Sed la sekvantan jaron li organizas surkontinentan cirkviton : Bruselo, Waterloo, Rejno-bordoj, Strasburgo, Parizo; vojaĝo, restadoj, vizitoj estas tiel kontentigaj, ke oni devas bisi la ekskurson.

Sed, jen nova serioza bato : La Midlands-Fervojoj decidas, okaze de Internacia Ekspozicio en Londono, en 1862, zorgi mem siajn vojaĝantojn. Thomas Cook estas 50-jara. Kion fari?

Li sin turnas al alia turisma branĉo : loĝado. Li aĉetas en Londono serion da loĝejoj nove konstruitaj, sen cimoj, malmute kostaj. Li luigas ilin (2Ŝ por dulita ĉambro) al abstinec-anoj kaj al vizitantoj de la Ekspozicio. Plie li devas lui la najbarajn domojn kaj granda halo fariĝas dormejo. Por la pli riĉaj klientoj, oni trovis unuarangajn loĝejojn (po 6ŝ. tage, entenataj salono, teo kaj trinkmono).

T. Cook loĝas pli ol 20.000 turistoj dum tiu Ekspozicio. Ĉi tie li havas sian turisman oficejon kaj folkloran vendejon, (kun dekoracio de damaoj pajleŝtopitaj); en ĝi oni trovas skot-produktaĵojn, juvelojn, biskvitojn, librojn, ŝtofojn, litografojn de rimarkinduloj, kaj eĉ ankaŭ (por 45 ŝ.) portreton de T. Cook kun kostumo speciala nomita « la ekskursanto » (same kiel la Cook-ĵurnalo).

La Cook-ĵurnalo laŭdis la bonajn anglo-francajn interrilatojn. Sekve, arope, anglaj komercistoj (kun « caps » kaj kvadritaj kompletoj da vestoj) laŭiras la parizajn avenuojn. Antaŭe, T. Cook zorge atentigis siajn zorgatojn pri la danĝeroj de la « gaja Parizo » kaj de « fren-cancan, dancata de virinetoj, kies gestoj akcentas la malĉastan karakteron ». Sed povas okazi, ke Diablo akompanas Dion . La turistoj revenas hejmen kun la okuloj nubaj je mil memoraĵoj.

En 1864, la Cook-diliĝencoj, sur la spruroj de Hannibal iras tro Monto-Ĉenero, Torino, Milano, Florenco kaj revenas laŭlonge de la Floranta Riviero.

La malgranda oficejo en Bloomsberry ne plu sufiĉas. Oni instaliĝas en Fleet Street. La domego entenas ĉambrojn zorgatajn de S-ino Cook, oficejon por vendi biletojn, gvidlibrojn pantoflojn, teleskopojn. Ĉi tie oni ankaŭ okupiĝas pri pasportoj, asekureco,, reklamado kaj pri transporto de pakaĵoj tra Anglujo.

John ĵus fariĝis Estro de la entrepreno. Li montras kaj montros eksterordinaran agemon.

Le vojaĝo en Ameriko komencis per administracia kontakto : la doganistoj postulas 25 dolaroj imposton por la 25.000 reklamflugfolioj, kiujn Cook intencas disdoni al Amerikanoj. En la centra kaj orienta regionoj la periplo kovras 15.000 km; T. Cook konatiĝas kun la Amerika-Ekspres-Societo, kiu nombras 900 oficejojn en 10 ŝtatoj. Starigo de turista regularo postulis, fronte al malfacilaĵoj kaj longaj diskutoj, multe da pacienco kaj obstineco.

Konklude; 25 gineoj en unuaklaso, kaj 16 en duaklaso permesas vojaĝi de Southampton al New York.

En Eŭropo la aferoj iras plej kontentige :

— nova periplo vizitas Nord-Italion, Aŭstrion, Hungarion kaj revenas tra Tirolo kaj Svisujo

— alia itala cirkvito, daŭras unu monaton kun kulmino en Napolo-golfeto

— aliaj grupetoj cirkulas eĉ al Grand-Nordo.

(daŭrigota).



# AŬTORAMO



Ek de 1963 estis kolektita en mirinda kadro, en Yerres (departemento Essonne), 18 kilometrojn de Parizo, unu el la plej belaj aroj da malnovaj aŭtomobiloj. Tre rapide en la bieno de la kastelo de la Grange kreiĝis muzeo, kies estro estis Sro Jacques Rousseau, historiisto de aŭtomobilo.

La ĉefa celo estis kolekti ne nur malnovaĵojn sed ankaŭ fari selektadon de teknike valoraj aŭtomobiloj. Aŭtoramo estas ankaŭ Interŝanĝo-Borso internacia, kun anonco-bulteno, restaŭrejo, kaj dokumentejo. La Muzeo entenas 160 aŭtomobilojn (1896-1955) el kiuj 90 kapablas funkcii, 15.000 arkivajn fotojn, specialajn katalogojn, kiuj « kovras » 40 jarojn, kaj 6 tunojn de aŭtorevuoj.





En la 10 ĉambregoj, la vizitanto povas vidi : malnovajn ĉevalveturilojn, malgrandan Clement (1899) kaj la monstrojn Aries, Bugatti, Corre, Cadillac, De Dion Bouton, Delaunay, Delahaye, Hotchkiss, Voisin... (1910-1956). Ankaŭ bicikloj estas videblaj : Draisiennes, Michaux, Granda Bi ; motorcikloj Harley-Davison (1916), René Gillet (1936) ; kaj multaj akcesoraĵoj, foje tre strangaj, « gaĝetoj » de la pasintaj tempoj, kiuj konsistigas pitoreskan magazenon.

# Francaj verkoj en Esperanto

Ekzamenante la libroliston de la Brita Esperantista-Asocio, oni trovas sub la rubriko « Generala Literaturo », ke oni proponas ok verkojn tradukitajn el la franca, kaj nur kvin el la germana. Ne multaj. Sed eble ĝusta proporcio, se oni konsideras, ke la franca estas literatura lingvo dum mil jaroj, kaj la germana dum nur proksimume kvarono de tiu tempo.

Sub la rubriko « Dramo kaj Verso » troviĝas du francaj verkoj kontraŭ tri germanaj. Tiuj tri germanaj verkoj estas ĉiuj klasikaĵoj (ĉiuj de Goethe). Kontraste, la du francaj verkoj estas modernaj prozaj dramoj. En la BEA listo, la sola traduko de franca verko de la klasika periodo (ni diru de 1600 ĝis 1800) estas « Kandid » de Voltaire en la ne tute kontentiga traduko de Lanti.

Nu, tiu listo de BEA taŭge reprezentas la pozicion pri tradukoj el la franca literaturo. Oni rajtas diri, ke la ĉefverkoj de la franca literaturo preskaŭ ĉiuj restas sen traduko en nia lingvo. Estas tipa, sed bedaŭrinda fakto, ke mankas franca antologio. Ekzistas dise tradukoj de diversaj poemoj kaj prozaĵoj el ĉiuj periodoj, de la 12a jarcento ĝis niaj tagoj. Oni citu, kiel ĉefverko de la arto de Kaloksaj, la baladon de Villon (15a jarcento) pri tiu-ĉi kaj liaj kunuloj, kondamnitaj iri en la pendingon

Kalocsaj, Waringhien, kaj aliaj tradukis la tutan verkaron de Baudelaire, poeto de la 19a jarcento, kiu tiom influis la evoluon de la moderna poezio. Sed jen escepta kazo.

Ŝajne, oni neniam tradukis longan francan versaĵon, krom la tradician eposon, la « Kanto pri Rolando », el la 11 aŭ 12 jarcento. Tion tradukis Dro Noel je la komenco de nuna jarcento.

El la verkoj de la tri ĉefaj dramistoj klasikaj — Molière, Corneille, Racine — ekzistas nur 3/4 prozaj komedioj de Moliere, inter ili « Georges Dandin » (tradukis Dro Zamenhof mem) kiun oni prezentis dum la Unua Universala Kongreso, kaj « Don Juan » (tradukis Boirac).

La verkoj de Corneille kaj de Racine (kiun francaj kritikistoj volus almenaŭ egaligi al Shakespeare) restas virgaj ; same kiel la gravaj versaj komedioj de Molière (ekzemple « Tartuffe » kaj le « Misanthrope »). El tiu glora klasika periodo de Ludoviko XIV ni povas fieri havi tradukon (fare de Waringhien) de la Maksimoj de La Rochefoucauld. Sed finfine jen magra rikolto.

Estas strange, kiam oni konsideras la gravecon de francoj en la historio de la evoluo de nia lingvo, precipe dum la unuaj 15 jaroj de nia jarcento, ke tiuj eminentuloj tiom malmute tradukis el la propra riĉa literaturo. Eble oni povas klarigi tion per la fakto, ke plejparte el ili estis scienculoj, matematikistoj, k.t.p., kiuj ĉefe celis la praktikan utiligon de la lingvo, male ol la fruaj rusaj kaj polaj adeptoj, plejparte literaturemaj idealistoj.

Parenteze, oni povas rimarkigi, ke en la Fundamenta Krestomatio oni trovas neniun versaĵon tradukitan el la franca lingvo. Sed la komercaj leteroj en tiu Krestomatio (eldonita en 1903) estas de Louis de Beaufront.

Laŭ mia eltrovo, ni havas neniun gravan tradukon fare de Javal, Sebert, Bourlet, Michaux. Tamen ni ne rajtas preterlasi la tradukon, kiun verkis Gaston Moch, de la « Reĝo de la Montoj » de Edmont About. Oni rajtas diri, ke About estas nur duagrada verkisto de la 19a jarcento. Sed, jam leginte la originalon, mi tre plezure dufoje legis la tradukon de Moch. (La ilustraĵoj fare de Gustave Dore donas aldonan ĝuon).

Eble, kialo de la manko de tradukoj de versoj de la klasika periodo estas, ke oni ĝis nun ne trovis kontentigan solvon de la problemo : kiel traduki la klasikan 12 - silaban verson en maniero taŭga por drama uzo.

Aliaj gravaj verkistoj, kiujn ni ne konas en traduko estas Rabelais (kvankam laŭ Sro Motillon de Tours ekzistas traduko en manuskripto), de Victor Hugo (denove, oni diras, ke ekzistas traduko en manuskripto de « Les Miserables »), de Rousseau, de Flaubert, kaj de aliaj romanistoj de la 19a jarcento ; Traduko ekzistas (kvankam mi neniam vidis ekzempleron) de unu verko de Balzac (« Eugénie Grandet », fare de Gosse), kaj de verkoj de Guy de Maupassant (krom « La Normandaj Rakontoj », tradukitaj de R. Dupuis), de Daudet (krom kelkaj el liaj « Leteroj el mia muelejo »). Mankas tradukoj de Proust kaj de Gide. Bedaŭrinde, ke Sro Sturmer, kiu tiom alte taksis Gide, ne tradukis unu el liaj verkoj anstataŭ « La Princino de Marso ».

Pri modernaj verkoj mi ne estas kompetenta (nek laŭ la Wellsa nek laŭ la Butlera signifo). Tamen, ŝajnas al mi neproporcie, ke ni havu tradukojn de du dramoj kaj de unu romano de Sartre (« Naŭzo », tradukita de Bernard) krom eseon pri li, kun specimenaj tradukoj fare de fino Llech Walter, dum ni ne havas tradukon de « Topaze » de Akademiano Pagnol (1). Kaj oni devas ĉi tie agnoski, ke ĉiuj tradukoj faritaj de Bernard kaj de Waringhien estas veraj ĉefverkoj de tiu malfacila arto.

Fine, inter verkistoj malpli gravaj sed multe legataj, estus agrable havi tradukon el la verkoj de Françoise Sagan, kaj persone mi tre dezirus, ke Dro Waringhien, kiu tion amas detektivromanojn, donu al ni almenaŭ unu aventuron de Komisaro Maigret.

Estas tute eble, ke mi ne sukcesis trovi kelkajn gravajn tradukojn, kiuj povas ekzisti, kaj tre dankus ke oni min informu pri ili.

J. G. Fowler, el Londono.

---

(1) Sro J. Régulo-Pérez eldonis « Topaze » de M. Pagnol kaj « La ŝipego Tenacity » de Ch. Vildrac en 1960, en traduko de Roger Bernard kun prezentoj de Pro Waringhien.

---

Pro devaluto de la franca mono kaj plialtiĝo de la preskostoj jam de pluraj monatoj, la abonprezo estos, ek de la **31-a de Januaro :**

| | |
|---|---|
| SIMPLA ............ | **10,00 fk.** |
| BONFARA .......... | **15,00 fk.** |

**ABONU aŭ REABONU TUJ**

LA PROVENCA LITERATURO

# Roumanille, Mistral, Aubanel

## *tri fondintoj de l' « felibrige »* (II)

De 1896 ĝis 1906, Mistral organizis Provencan Muzeon (Museon Arlaten), kolektante ĉiuspecajn memorindajn provencaĵojn.

Preskaŭ ĉiuĵaŭde, kun la sama reguleco kaj trankvila vigleco kiu karakterizas lian tutan agadon, li venis en Arles por zorgi pri la kolekto. Fine li povis, dank'al Nobel premio (1904) instali tiun Muzeon en landsinjora hotelo de la XVIa jarcento.

— Antaŭ ĉio Mistral estas pura klasikulo. Kiel la malnovaj Grekoj kaj ilia disciplo Virgilio, li kunigis en siaj versoj kaj prozo ecojn tute kontraŭajn, ilin akordigante en supera harmonio. Li estis samtempe la poeto de la ĝojo kaj de la doloro, de la trankvilaj sunigitaj senfinaj ebenaĵoj ,kaj de la fieraj, grandarbaj, profundvalaj montaroj. Jen li movetas la ridon, jen li disŝiras la koron. Sed la rido estas ĉiam nobla, la kordisŝiro ĉiam ekvidigas esperon. Poeto de la vivo plena kaj de la terura morto, li neniam malnobliĝas en la plezuroj aŭ perdiĝas en la malespero : la vivo de li pentrita estas heroa, tio estas danĝera kaj ne certa ; la morto ankaŭ enhavas ion supernaturan kiel komenco de pli bela vivo. Kantisto de la amata Provenco, oni ne scias ĉu li vidas ĝin en la estinta tempo tra la poeziaj legendoj aŭ en la estonteco tra la felibraj revoj, ĉie precizaj detaloj kaj samtempe malnetaj simboloj.

— La stilo mem prezentas tiajn kontrastojn. Simpla kaj popola, ĝi subite atingas, per flugilbato, la altajn pintojn de la plej elokventa lirismo. Larĝaj strofoj je ampla ritmo najbariĝas kun eltrovaĵoj de artega versfarado. Tute sama estas la prozo. Flua, harmonia kaj fluganta, ĝi iras malpeze kiel budito inter la grenejaj sulkoj .De tempo al tempo resonas verso, kiel fllugas la birdeto kiam ĝi deziras salti de unu sulko al la alia.

— Similmaniere. la Mistrala penso rezultas de la akordo inter kontraŭaj tendencoj. Tial. oni devas bone atenti por ne altrudi al li opiniojn malverajn. Kiom da fojoj, ekzemple, oni diris, ke li estas malfavora al patriotismo, pretekste ke li laŭdegas sian Provencon. Ne ĝuste tamen, ĉar ĉiuokaze li esprimis al Francujo plej sincerajn kaj sindonemajn sentojn, certigante. ke la plifortigo de la malgranda patrujo prosperigas la grandan. Eĉ liaj revoj transflugis Francujon : li ofte ekvidis en la estonteco grandan unuiĝon de la Latinaj Rasoj kaj preskaŭ fondis, almenaŭ image kaj kore, la **Imperion de la suno.**

Ankaŭ li kunigis la idolanan animon, tute kaptitan de la korpa beleco kaj de la virina ĉarmo, kun plej sincera infana amo al Dio, al Kristo .al Sankta Virgulino. Imagante la feliĉan epokon de la Avinjon'aj Papoj, li tre ŝatis samtempe la solenajn procesiojn de helaj dimanĉoj kaj la kamparajn dancojn je la sono de l'tamburetoj : ĉe ambaŭ li admiris la kostumon kaj la elegantecon de la belegaj Provencaninoj.

Mane de l'Sanktaj Feinoj, Mistral ricevis en sia lulilo tri donacojn : longan kaj feliĉan vivon, sufiĉan riĉecon, genian saĝeson. Tiujn donacojn li uzis sen persona ambicio, sindoneme al sia kara lando, al la pura idealo unu fojon por ĉiam de li elektita.

En sia Maillan'a hejmo, apud edzino plej inda je tia viro, li trapasis helan, noblan kaj preskaŭ superhoman vivon respekte amata de ĉiuj, vizitata ĉiutage de pilgrimantoj.

Kaj iun tagon, ĉe la fino de l'vintro, lia koro malforta de malvarmo kaj de longega batado, restis senmova. Estis la 25an de marto en la jaro 1914a

**Aubanel.** — Teodoro Aubanel naskiĝis en Avinjono la 26an de marto 1829. Liaj prapatroj estis establitaj en tiu urbo kiel presistoj jam de la XVIIIa jarcento. Ili estis ricevintaj la titolon de «Presistoj de la Papo ».

La juna Teodoro estis studento en Aix kaj poste li



okupiĝis, kun sia frato Karlo, en la presejo de la patro. l' «Felibrige ». Li estis unu el la plej ardaj inter tiuj entuziasmaj junuloj kiuj volis konkeri Provenclandon.

En tiu juna grupo li trovis pli ol amikoj ; li tie renkontiĝis kun sia una « stelo », la bruna Zani (Jenny Manivet), kun kiu li skizis la plej puran kaj ardan aman romanon.

Sed Zani fariĝis monaĥino, lasante nekonsoleblan amanton.

Tamen en aprilo 1861, Aubanel edziĝis kun F-ino Jozefino Mazen el Vaison .La poeto plena je entuziasm kaj ĉagrenegita de la rememoro de la forflugintaj revc, ne estus povinta trovi edzinon pli inteligentan kaj ameman .

For de sia hejmo Aubanel multe uzis siajn fortojn. Dum la « felibr'aj kunvenoj » li estis ĉiam arda por defendi la « aferon », kaj la prelegoj faritaj de li en tiuj renkontoj ĉiam havis la ardecon, la lirikecon, la forflugecon de siaj plej belaj versoj.

Kun kelkaj el siaj amikoj li ĉeestis, tra Provenco, la patronain festojn, kie oni multe ŝatis «la kisojn de la maljunaj vinoj kaj de la ĉarmaj junaj fraŭlinoj ».

Aubanel ĉiam tre ŝatis vojaĝi. Li ofte iris al Parizo, kie li propagandis por la « Felibr'a afero »[e]; tie li interrilatis kun amikoj fame konataj en la beletra kaj arta medioj. Kaj li vizitis Romon, Milanon, Venecion kaj Vienon.

Ĉie Aubanel estas sentema pri la virina beleco. Li ĉiam konservas la memoron de Zani.

— La verkaro de Aubanel entenas nur ses librojn ; tri por poezioj du por dramoj, unu por korespondado :

I. — « La miougrano entre duberto » (la granato duon-malfermita) 1860 : estis, post Mirejo, la brila verko kiu firmigis la komencantan agadon de la « Felibroj ».

Tiu poeziaro estas dividita en tri partoj :

1) « Lou libre de l'amour » (la libro de l'amo),
2) « L'entrelusido » (la helaĵo),
3) « Lou libre de la mort » (la libro de la morto).

II. — « Li fiho d'Avignoun » (la avinjonaj fraŭlinoj), 1885-1891 : estas la gloro kaj la triumfo de Aubanel. En tiu libro oni trovas la majestecon de lia arto kaj la etendiĝon de lia genio. Multaj el tiuj poezioj rilatas al la virina beleco. La plej konataj estas : « La Arlesa Venuso », « L'Avinjona Venuso », « Venecianino ».

III. — La tria libro, verse skribita estas «Lou reire souleu » (la transtomba suno) 1899, kompilita de Ludoviko Legré post la morte de Aubanel.

IV. — « Lou pan dou pecat » (la pano de l'peko), 1882-1903 : restas la modelo de provenca dramo. La kadro estas admirinda[e]; ĝi estas parto de provenca lando movigata de intensa vivo. Ŝajnas kelkfoje esti himno de la grundo al la suno.

La sentoj, — kulpa amo de Faneto (la edzino) ; kaj Ĵaluzeco de Melandrano (la edzo), estas esprimitaj tie kun la sama fortega sincereco kiun Aubanel metis en sia verko kiel pasia koloramanto. Eĉ la legendo de la malbenita pano donas al la verko popolan guston kaj altnivelan moralecon.

Tiu dramo estis prezentita en la teatroj de Montpellier kaj Alès en 1878 kun vera triumfa sukceso.

V. — Aubanel verkis du aliajn dramojn : « Lou roubatori » (la forrabo) kaj « Lou pastre » (la ŝafpaŝtisto)[e]; nur la unua estis eldonita.

VI. — « La leteroj al Mignon » (1899) entenas la korespondadon de Aubanel kun F-ino Sofio L... Amemaj kaj entuziasmaj tuj de la komenco, la leteroj de Aubanel restis respektplenaj kaj admiresprimaj. Tiu korespondado, plibone ol iu ajn alia atesto pruvas la naivan, fieran kaj maltiman karakteron de Aubanel.

Li mortis en 1886, 57 jaraĝa.

— La vivo kaj la verkaro de Aubanel sin klarigas reciproke unu per la alia. Li estis pasia artisto. Li neniam hontis pri siaj amsentoj. La virinoj imagataj de li estas modeloj de beleco; ili estas tiel puraj kiel la aliaj belegaĵoj en la naturo. La brileco de unuj kaj de aliaj venas de la sama suno kiu ilin orumas.

Aubanel apartenas al la sama raso kiel la veneciaj pentristoj ; li sentis por ili veran fratan admiron.

Lia poezio prenas specialan propran karakteron kiam oni atakas liajn intimajn sentojn : « Lou poutoun de Judas » (la kiso de Judaso) estas akra protesto pri lia katolika kredo ofendita ; « Proumeteŭ » (Prometeo) estas la ekkrio de lia franca kaj provenca patriotismo.

— La stilo de Aubanel estas ravo. Oni ne trovas pli belajn versojn en la tuta provencala literaturo. Tiu stilo estas naiva kaj simpa en « la granato » sed ĝi jam havas viglecon kaj akrecon.

En « la pano de l'peko » ,la lingvo estas multe pli kolora kaj varma, sed restas ankoraŭ simila je la lingvo de l'popolo.

« La fraŭlinoj avinjonaj » necesis pli da virtuozeco ; Aubanel tie montriĝas kiel perfekta klerulo.

La versfarado prezentas la samajn kvalitojn de pureco, fleksebleco kaj potenco.

Oni trovas, jam en la « granato », la plej multajn en la ritmoj renovigitaj de la « felibroj » ; certe l'aleksandra verso estas la plej malofta. Sed tamen la versoj pli mallongaj adaptiĝas al la gravaj pensoj de l'altnivela poezio.

Aliparte, la provenca lingvo, dank'al sia kantanta ritmo, kiu forte dispartigas la silabojn, donas al la verso iom pli da amplekson kaj musikan daŭron.

La sonetoj estas oftaj en la verkaro de Aubanel. Tiu formo bone taŭgas je lia genio sobra, vigla kaj ĉiam serĉanta la perfektecon.

— La « stelo » de Teodoro Aubanel pli kaj pli altiĝas en la ĉielo de Provenclando. Ĉiam kreskas la nombro de la kompetentuloj kiuj konsideras la belajn versojn de l' « Avinjonaj fraŭlinoj » kaj la fortajn akcentojn de la « Pano de l'peko », same kiel la plej puraj ĉefverkoj de ĉiuj tempoj kaj de ĉiuj landoj.

— Aubanel ,en provenca lingvo, signifas tiun blankan agon kiu vizitadas la pinton de l'monto Ventoux.

La poeto de l'« Arles'a Venuso » havas la saman brilecon kaj la saman amplekson. Lia flugado estas tiel alta kiel tiu de Mistral.

Nun mi povas konkludi dirante :

Mistral estas, antaŭ ĉio, granda epopea poeto, scienckapabla kaj agema viro,

Roumanille triumfis per la fabeloj kaj la poezio familia,

Aubanel restas la granda poeto de l'amo, la heredanto de la Trobadoroj sed kun pli granda sincereco.

Honoré BOURDELON.

***ANTAŬ 200 JAROJ NASKIĜIS EN MOSKVO***

# IVAN ANDREJEVIĈ KRYLOV



## Fama rusa fablisto

I.A. Krylov naskiĝis en 1769 jaro. Li estis naturdotita meminstruito. Komence li verkis komediojn. Poste eldonis satirajn ĵurnalojn, kiujn caraj cenzuristoj malpermesis. Ekde 1789 jaro li dediĉis sian talenton al fabloj, kiujn entute verkis pli ol 200. I.A. Krylov tradukis kaj imitis fablojn de la eminenta franca fablisto Ĵan Lafonten. Tamen la granda Gogol diris, ke en la fabloj de Ivan Krylov « ĉie estas Rusio kaj ĉio odoras per Rusio »...

Junaj lernantoj bone scias fablojn de aveto-Krylov kaj amas lin. Multaj linioj el la fabloj por ĉiam fariĝis konataj inter popolo en formo de proverboj kaj « flugilhavaj vortoj », kiuj ofte ripetiĝas en la ĉiutaga vivo.

Mi prezentas kelkajn fablojn, kiujn tradukis el la rusa Aleksandr Logvin.

### SCIVOLULO

« Amiko, mi salutas vin ! De kie
[ vi ? »
« Ho, en muzeo estis horojn tri.
Mi ĉion vidis ; estis surprizita,
Vi kredos ? Tiel mirigita,
Ke eĉ rakonti dubas mi.
Plenpleno da mirakloj por plezuro !
Mirindaj estas verkoj de l'naturo !
Ho kiaj birdoj, kiaj bestoj en origi-
[ nal' !
Kaj kiaj papilioj, skarabetoj,
Muŝetoj, blatoj kaj kuletoj !
Similaj al smeraldo, al koral' !
Kaj kia kokcinelo eta !
Ne pli ol pingla ĉi kapeto !
« Ĉu vidis elefanton vi ? En kia
[ stat'
Vi trovis eminentan ĉi giganton ?
« Ĉu tie estas ĝi ? » — « Ho jes ! »
— « Pardonu, frat'
Mi ne rimarkis elefanton ».

---

### FRINGELO KAJ KOLOMBO.

Fringelo trafis Kaĝon pro la Krima
[ ag'.
Malfeliĉulo ĵetis sin kaj reton skuis.
Kaj juna kolombeto moke ĝin
[ instruis :
«Vi hontu, — diris ĝi — dum hela
[ tag'...
Kaj vi — Kaptita !
Neniam tiel estus mi trompita,
Mi tion scias tute ĝuste. »
Subite jen baraktas mem en
[ kaptoret'
Do juste :
Al fremda malfeliĉ' ne moku,
[ kolombet'.

### KOKO KAJ PERLA ERO

En sterkamaso dum fosad' senĉesa
Perleron trovis iu kok'.
Kaj diras kun neglekta mok' :
« Por kiu estas ĝi necesa ?
Kaj ĉu ne stulte, ke simila bagatel'
Ĉe homoj egaligas al juvel'.
Mi ĝojus al hordea grajn' : ne tiel
[ brila,
Sed utila.
La profanulo juĝas en la sam-nivel',
Se ne komprenas ion — diras :
[ bagatel' !

---

### PORKO.

La porko en sinjoran korton sin
[ enŝovis,
Kaj vagis ĉirkaŭ kuirejo, ĉevalstalo,
Diversan rubon, sterkon trovis,
Finfine banis sin en postlavaĵo sala :
Kaj hejmen venis al baraĵ'
Kun tipe porka eksteraĵ'.
« Nu, kion vidis vi, Havronjo, (1) en
[ la korto ? »
Demandis la paŝtisto ĝin
« Kiel impresis vin
Trezoroj de riĉuloj, kiuj banas sin
En vivo de envia sorto ? »
Havrojno gruntas : « Jen absurdo kia!
Rimarkis la riĉecon mi nenian-
Nur sterko, rubo... Kredu vi al mia
[vort'
Mi kun persisto vere bruta
Trafosis tuton,
En posta kort'.
Neniun volus mi ofendi per kompar' !
Sed ĉu ĥavronjon kritikist' imitas,
Se ekskluzive nur malbonon citas
